Esperanto

Ni volas plibonigi la mondon

Probeminute

Karaj esperantistoj, ĉi tiu rito de nov-jaraj salutoj kiel ĉiuj ritoj havas siajn a/vantaĝojn kaj malavantaĝojn. La avantaĝo estas, ke ĝi estas io konata kaj donanta cer//tecon. Nenio esence nova aŭ revolucia povas esti en nov-jara saluto. La mal///avantaĝo estas, ke nenio nova aŭ revolucia esence estas en nov-jara saluto.

Ni provu kunmeti avantaĝojn kaj malavantaĝojn kaj diri ion tre malnovan, kio, tamen, por / kelkaj novaj esperantistoj ŝajnos revolucie nova. Kial ni estas membroj de Universa//la Esperanto-Asocio? Kial ni estas esperantistoj entute? La unua tago de la /// jaro estas la ĝusta tago por demandi sin pri tio. La ĉefa fonto, al kiu ni devas reiri,

estas la statuto de Universala Esperanto-Asocio, kaj ni devas legi kune la celojn, / kiujn Universala Esperanto-Asocio kaj ni ĉiuj deklaras realigindaj. La artikolo // 3-a de la statuto marmore firme tekstas. La celoj de Universala Esperanto-Asocio estas: /// disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto, agadi por la solvo de la lingva

problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon, plifaciligi la ĉius/pecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, reli//gio, politiko aŭ lingvo, kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvi ĉe /// ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj. Ni estas por disvastigi la uzadon de la internacia //// lingvo Esperanto.